

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2016

Jarkolekto 3 - Numero 2

ESPERANTO-FOUNDATION CANDIDATE FOR THE
NOBEL-PEACE PRICE 1965



Dear Fellow-Dealer,

The Esperanto-foundation has entrusted us with the sole distribution of the new International Esperanto coin of 25 Steloj, which is the logical conclusion of the previously (1959) issued-set of 1-5-10 Steloj.

This beautiful silver Crown-Size Proof-coin, which will be struck this summer, will cost YOU only \$ 4.- (in this amount are included all costs of shipping and insurance).

Due to the limited number of pieces struck (only 10.000), we expect a fast sale. Therefore we suggest you to order without delay.

Advertisement at retail-price has already been made in Coin World and World Coins.

In the meantime we remain,

yours sincerely,

DUTCH COIN CO.
J. C. A. LOON

Distributors: DUTCH COIN COMPANY
J. C. A. Loon - P. O. Box 4090
Rijswijk (The Hague) Holland
Cables: Numismatica-Rijswijk

ENHAVOTABELO

de aprilo 2016

Titolpaĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni	3
Moneroj & medaloj	4
<i>La unuaj steloj (1959)</i>	
<i>Hispana Kongreso 1991</i>	
<i>72-a Universala Kongreso en Varsovio</i>	
<i>UK-medalo 1914 Parizo</i>	
Aspektoj de numismatiko: La origino de la monero	10
Historiaj aspektoj: La steloj de Universala Ligo (1).....	12
Terminaro: alfabeto listo (6)	14
El la gazetaro: Eĉ fisko ekĉasas bitmonon!	15
Retpoŝto	17
Anoncoj & eventoj	27

Tajpado + paĝaranĝo: Vivienne Tudts

Provlegado: Jozefo Horvath

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!

Finredaktoro: Bert Boon

De ni por ...ni!

Saluton al vi ĉiuj, karaj ENA-membroj kaj aliaj legantoj!

Ni eke raportu kelkajn bonajn novaĵojn. Dank' al adresaro de nia Elda Doerfler, triestanino, ENA-membro kaj fervora prezidanto de ELF-AREK, nia asocio nun, en aprilo 2016, jam havas du novajn membrojn (vidu ankaŭ "Retpoŝto"-n!). Ĉu bona novaĵo? Jes, evidente! Ĉu aliaj membroj dume ankaŭ provis persvadi samlandanojn aliĝi al ENA? Jes, sendube! Ĉu sukcese? Kial eble ne!?

Asocio, ĉefe nova, kiu marŝetas surloke, ne kreskos. Tial ni jam ofte instigis niajn karajn membrojn mem varbi en la rondoj de geamikoj, geparencoj, gekonatoj. Ni faris eraron, ĉar ni ne klarigis kiel... Tiel ni ne sukcesos! La adresaro de Elda montras ja la rektan vojon ...

Do, nun nova, alia instigo, strategie senegala, espereble pli sukcesa. Kial ne sendi varbmesaĝon al via persona esperantista adresaro? [Tial ENA publikigas sur la paĝo 30 de ĉi numero informilon-varbilon, kiun vi simple kopiu kaj sendu al la aro aŭ areto de esperantistoj, kies retadreson vi jam konas.](#) Ni do petas fari unuan novan paŝon kaj deziras sukceson al vi ĉiuj. Anticipe ni kore dankas vin pro via ege necesa kunlaboro.

Pri ĉi numero la enhavotabelo laŭkutime montras la vidindaĵojn kaj legindaĵojn. Ĝi estas la unua, kiu pritraktas la historie duan provon de la iama esperantistaro krei eŭropan (eĉ mondan) valuton. Vi legos pri la historio de tiu pionira batalo, kaj vidos la konkretajn rezultojn en formo de moneroj kaj monbiletoj.

Ĝenerala artikolo pri la deveno, la origino de la monero estos vojaĝo returne en la historion.

Novaj terminoj pliriĉigas la senĉese kreskantan liston, kies sesa parto atendas vian scivolemon.

La aktuala fenomeno de bitmono (bitcoin) petas kromajn klarigojn, pri kiuj oni senpene trovas novaĵojn en naciaj gazetoj.

Nia trimonata retpoŝto finfine provas, ke la legantaro de la ENA-revuo ne nur pasive legas kaj konstatas.

Konkludo: ENA vivas kaj vivados per via entuziasmo!!

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

La unuaj steloj (1959)

A.1.



Lando: Nederlando

Kvanto: 10.000

Metalo: bronzo

Pezo: 2 g

Diametro: 20 mm

Medalisto: A.A. Molenaar

Jaro: 1959

Valoro: 1 stelo

Averso:

Granda, kvinpinta stelo kun valorindiko 1 STELO kaj skribo:

“UNIVERSALA LIGO” kun jarindiko 1959.


Dekstre de la valorindiko: signo de la monfarejo, maldekstre signo de la estro de la monfarejo.

Reverso:

Blazonŝildo de Universala Ligo kaj skribo:

“UNU MONDO – UNU LINGVO – UNU MONO”

Rimarko: 1



Rimarko 2:



Fiŝo: signo de monfarejestro J.W.A. van Hengel

Merkurbastono: signo de monfarejo

Rimarko 3:

Legu pli pri Universala Ligo en la rubriko “HISTORIAJ ASPEKTOJ” p.12

A.2.



Lando: Nederlando

Kvanto: 10.000

Metalo: latuno

Pezo: 4 g

Diametro: 23,5 mm

Medalisto: A.A. Molenaar

Jaro: 1959

Valoro: 5 steloj

Averso:

Granda, kvinpinta stelo kun valorindiko 5 STELOJ kaj skribo:

“UNIVERSALA LIGO” kun jarindiko 1959.


Dekstre de la valorindiko: signo de la monfarejo, maldekstre signo de la estro de la monfarejo.

Reverso:

Terglobo kun ĉirkaŭa skribo:

“LA MONDO ESTAS UNU LANDO – LA HOMARO UNU POPOLO”

Rimarko 1:



Rimarko 2:



Fiŝo: signo de monfarejestro J.W.A. van Hengel Merkurbastono: signo de monfarejo

Rimarko 3:

La valoroj de la stelomoneroj estis deponitaj en la Nutspaarbank en la urbo Hago (Nederlando).

A.3.



Lando: Nederlando

Kvanto: 10.000

Metalo: kupronikelo

Pezo: 8,5 g

Diametro: 28 mm

Medalisto: A.A. Molenaar

Jaro: 1959

Valoro: 10 steloj

Averso:

Granda, kvinpinta stelo kun valorindiko 10 STELOJ kaj skribo:
“UNIVERSALA LIGO” kun jarindiko 1959.

Dekstre de la valorindiko: signo de la monfarejo, maldekstre: signo de la monfarejestro

Reverso:

Busto de Zamenhof, rigardante maldekstren kaj ĉirkaŭa skribo:
“D-ro L.L.ZAMENHOF KREINTO DE ESPERANTO”

Rimarko: 1



Rimarko 2:



Fiŝo: signo de monfarejestro J.W.A. van Hengel

Merkurbastono: signo de monfarejo

Rimarko 3:

La monfarejo en Utrecht [utrecht]



B. Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Hispana Kongreso 1991



Lando: Hispanio

Kvanto: nekonata

Metalo: flava bronzo

Pezo: 65 g

Diametro: 50 mm

Medalisto: nekonata

Jaro: 1991

Diko: 4 mm

Averso:

En cirklo la urba blazono de la kongresa urbo La Laguna kun devizo:

“MICHAEL ARCANGEL – VENI IN ADJUTORIUM POPULO DEI THENERIFE ME FECIT”

Ĉirkaŭe: “EXCMO. AYUNTAMIENTO DE LA LAGUNA -
51^A HISPANA KONGRESO”

Reverso:

Busto de Zamenhof ĉirkaŭata de skribo:

“LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF 15-12-1859-14-4-1917”

Rimarko 1:

La medalo estas memoriga numismatikaĵo pri la 51a Hispana Kongreso de Esperanto en la urbo La Laguna (Kanariaj Insuloj)

Rimarko 2:

Blazono de La Laguna



Tipo A 1 - Esperanto-medaloj

72-a Universala Kongreso en Varsovio



Lando: Pollando

Metalo: bronzo

Diametro: 45 mm

Jaro: 1987



Kvanto: nekonata

Pezo: 64 g

Medalisto: nekonata

Diko: 5 mm

Averso:

Diino de la venko Niko kun glavo, la urba simbolo de Varsovio kaj skribo:
“72-a U.K. de ESPERANTO VARSOVIO 1987”

Reverso:

Busto de Zamenhof . Vizaĝo maldekstren kaj skribo:
“100-jara JUBILEO”

Rimarko:

Urba statuo je la honoro de la herooj de la 2a mondomilito.



Tipo D – Esperantaj unuflankaj medaloj

UK-medalo 1914 Parizo



Lando: Francio

Jaro: 1914

Metalo: kupronikelo

Kvanto: nekonata

Pezo: 8,75 g

Diko: 2 mm

Mezuroj: bazo 31 mm
oblikvaj flankoj 8 mm
vertikalaj flankoj 16 mm
supro 20 mm

Medalisto: nekonata

Unuflanke:

“Panoramo” de Parizo. En la dekstra, supra angulo: “MCMXIV” (1914).

Sube maldekstre: stelo kun litero E.

Tute sube: apartigita zono kun skribo: “10A KONGRESO•PARIS”.

Rimarko 1:

En la panorama bildo kelkaj famaj vidindaĵoj, kiel Eifel-turo, ponto tra la rivero Sejno kaj aliaj.

Rimarko 2:

Pro la abrupta eksplodo de la 1a mondomilito, la 10a UK estis nuligita tuj post la oficiala malfermo. Tre leginda artikolo pri tiu ŝoka evento troviĝas en: Ziko Marcus Sikosek: “Sed homoj kun homoj / Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005” p. 58-60.





Elektrumo



ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

La origino de la monero

La unuaj moneroj en la historio estis faritaj en Malgrand-Azio, en la hodiaŭa Turkio, ĉirkaŭ la jaroj 600-560 (a.K.).

Laŭforme ili estis etaj, ovalaj globetoj el elektrumo, natura alojo el oro kaj arĝento, tiam trovita i.a. en la rivero Puktolo, en kiu oni dum la antikveco trovis amasojn da elektrumaj skvametoj kaj buletoj.

Tiuj malegalaj globetoj havis ĉiuj la saman valoron, do sufiĉis surloke sumigi ilin okaze de sukcesa negoco. La ŝtata sigelo (ekzemple taŭro aŭ virŝafo) garantiis la metalvaloron, la pezon kaj la titron de la metaloj. La koloroj estis malsamaj, depende de la titroj de oro kaj arĝento.

Tiu tiam nova interŝanĝilo distingiĝis de la antaŭe uzataj pagiloj: globetoj, fragmentoj, brikoj aŭ ringoj el oro, kupro aŭ arĝento, sed kun malegala pezo, sen garantia sigelo, kiuj dum negocado ĉiam denove estis pesendaj. Dum jarmiloj ili tamen sukcese favoris la negocojn inter la popoloj de la Proksima Oriento.

La unuaj monereldonoj estas parte atribueblaj al la reĝo de Lidio, Aliato (610-560 a.K.), la patro de la fama riĉulo Krezo.

Sur la aversa flanko de tiuj unuaj moneroj troviĝis unu aŭ pliaj kvadrataj, kave gravuritaj sigeloj. La reverso ĝenerale montris reliefe stampitan simbolan bildon, kiu pli ofte montris beston: virkokon, virŝafon, virapron, virleonon aŭ virbovon. Eĉ insektojn!

Sur la moneroj, la taŭro estis sendube unu el la pli disvastigataj simboloj en la antikveco. Ofte ĝi referencis al la dioj Dionizo aŭ Pozidono. Ĝi estis la favora simbolo por vivĝojo, forteco kaj fekundeco!

Ni nepre rememoru pri la ora bovido en la Malnova Testamento, krome pri Zeŭso, kiu transformiĝis en blankan taŭron, por delogi la belegan Eŭropon, aŭ pri la famegaj taŭroj, kiuj kovris la Iŝtaran pordegon en Babilono, artaĵo el la sama epoko kiel la unuaj moneroj! Krom-krome ni ne forgesu, ke ankaŭ nuntempe la simbolo de financa sukceso estas la taŭro.

Tial citinda estas la moderna esprimo “bull market” (taŭro-merkato), kiu signifas, ke la internacia merkato estas bonsana. Tamen, aktuale ni pli korekte diru: ESTIS bonsana ...!

Fonto: “Encyclopedie van munten en bankbiljetten” (p.37), Samson Uitgeverij Alphen aan de Rijn, 1986

HISTORIAJ ASPEKTOJ

La steloj de Universala Ligo

A Enkonduko


La renaskiĝo de esperanta valuto estis la rezulto de tre fervora iniciato de Andreo Cseh [andreo ĉe], kiu fondis en 1942 Universalan Ligon en Hago (Nederlando), kunlaborante kun Internacia Esperanto-Instituto (I.E.I.). Tiu evento okazis sekrete je la 14a de aprilo 1942 (okaze de la 25a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof, do dum la nazia okupado de Nederlando.) Esperanto estis proskribita de la hitleranoj, kaj tial esperantistoj estis persekutataj kaj kelkaj eĉ eliminataj.

Tiu asocio de mondfederaciistoj, kies “misio” estis unuigi la homaron en harmonio, uzante komunan lingvon, ege sukcese varbis en Nederlando kaj eksterlande dum la postmilitaj jaroj. Pli ol 15.000 pesonoj aliĝis en la fruaj jaroj de la unua jardeko, post la malvenko de la nazioj.

Dum la unua internacia kunveno, okazinta je la 16a de marto 1946 en Hago, estis decidite relanĉi komunan, internacie stabilan monunuon. Fakte, estis eksperimento por interpaciĝi kun tute alia internacia ekonomia sistemo, por pruvi al la mondo, ke konfliktoj kaŭzataj de ekonomiaj premoj povus esti nuligataj per tia revolucia valutsistemo.

La valuta simbolo estis la kvinpinta stelo (kiun ne-esperantistoj tro ofte konfuzas kun la juda stelo!), kiu origine estis simbolo por la kvin kontinentoj.

La valoro de la stelo-normo estis jene fiksita: 1 stelo = 100 pintoj = tiama prezo de unu kilogramo da pano, kiu kostis 0,25 centojn, do kvaronon de la tiama guldeno.



Samtempe Andreo Cseh strebis krei internacian monbileton kun subteno de la Nederlanda Banko AK (=Akcia Kompanio). Tio ne eblis, ĉar tiu banko havis monopolon en Nederlando. Solvo estis eldoni bileton kun la nomo “PREMIO-KUPONO”.

La Ligo ekeldonis premio-kuponojn kun valorindiko en stelo(j) por internacia uzo (pago de aktivecoj, broŝuroj, ktp.). Tiu pagilo estis vastege kaj abunde uzata en la movado ĝis la 80aj

jaroj de la 20a jarcento! Universala Ligo do ne restis ĉe nura teoria mono, sed kreis realan pagilon en formo de kuponoj.



Premio- kuponoj estis eldonitaj nur en valoro de 1 stelo. UL intencis ankaŭ eldoni kuponojn de 5 kaj de 10 steloj, sed tio neniam okazis.

La kuponoj havas la mezurojn 61 x 48 mm kaj validecon kronologie limigitan. La unuaj validis ĝis la fino de 1950. Poste la daŭro estis plilongigita per surstampo de aldonaj jaroj en 3 diversaj koloroj:

- ĝis 1955: violeta
- ĝis 1965: violeta
- ĝis 1975: verda
- ĝis 1980: violeta
- ĝis 1985: ruĝa

La kuponoj estis aĉeteblaj en la UL-oficejo kaj ĉe I.E.I. en Hago. Ili estis uzataj por pagi membrokotizojn, gazetabonojn, aĉeton de libroj kaj krome kiel premio por varbado de novaj membroj.

Daŭrigota

TERMINARO

Alfabeto listo (6):

titro: *proporcio de la kvanto de multekosta metalo al la tuta pezo de la alojo*

elektrumo: *natura aŭ artefarita alojo el oro kaj arĝento, dum la antikveco ekstraktata en Malgrand-Azio*

monfari: *stampi monerojn; stampado de moneroj*

monfalsisto: *tiu, kiu faras malpli valoran aŭ senvaloran monon, trompe imitantan la ŝtatan*

monerstampilo: *ilo por stampi metalan aŭ paperan monon*

obolo: *dum la greka kaj romia epokoj nomo de monero, origine arĝenta, poste bronza. Sur la bronzaĵoj troviĝis la greka vorto "obolos". Tiu vorto devenas de la grekaj vortoj "obeliskos" aŭ "obelos". La vorto signifis "rostostango". Origine rostostangoj (turnrostiloj) estis pagiloj, ĉefe en Sparto, Tebo kaj Bizanco. / Alia signifo: eta mondonaco, almozo.*

monerstampaj matricoj (supra/malsupra): *gravurita metala peco aŭ muldilo, pere de kiu oni povas fabrikigi similajn pecojn per stampado (aŭ per fandado)*

randstampilo: *stampilo por ornami la randon*

krudmonero: *nestampita metaldisketo*

stampilstablo: *stablo por subteni la stampadon*

papermono: *monbiletoj*

luidoro: *ora monero el la epoko de Ludoviko la 14a (Francujo, 18a jarcento)*

EL LA GAZETARO

Eĉ fisko ekĉasas bitmonon!



Ĉu vi remomas la artikolon pri la tiel nomata bitmono en numero 4 de la 1a jarkolekto? Eble vi ankaŭ remomas, ke la virtuala valuto en 2014 ŝajnis akceli sur la vojo al definitiva venko. Post tiu - mi diru - manio, eĉ troa bruo, kiu tiam atentigis la ĵurnalistojn pri la fenomeno, hodiaŭ bitmono denove malaperetis inter la ombrojn de anonimeco.

Tamen ne tute, ĉar ekz. en la eta Belgio jam pli ol 70 vendejoj akceptas la virtualan pagilon. Krome, ĝi estas akceptata de diversaj kuracistoj kaj retejoj. Kelkaj butikoj eĉ donas rabatojn al tiuj, kiuj pagas per bitmono. En la nederlanda urbo Arnhem eblas pagi tiel en pli ol 100 lokoj. Laŭ *coinmarket-cap.com* en januaro 2016 la bitmono-merkato valoris 5,5 miliardojn da eŭroj!

Evidente, la fisko konsideras la imperion de reĝo bitmono kokino kun oraj ovoĵoj, observinda kaj kontrolenda...

Bitmono vere estas konsiderata kiel valida pagilo, ĉar la nombro de ordinaraj butikoj, kiel restoracioj, detalistoj kaj aŭtovendistoj senĉese kreskas.

En oktobro 2015 Eŭropa Tribunalo decidis, ke bitmono-negocoj estas senŝarĝigataj je AVI (Aldonvalora Imposto).

Lastatempe la novaĵoj pritraktas insidojn, kiel fraŭdo, montrompo kaj misuzo far krimuloj, por kiuj tia teknologio estas la ilo de iloj por blankigi nelegajn enspezojn.



En 2015 unuafoje pluraj bitmonoj estis konfiskitaj pro tribunala enketo. Tamen, dise estas profetata, ke la baza teknologio "blockchain" (blokĉeno) konkeros la futuron. Ĝi nuligos perantojn dum negocoj, ĉar la teknologio mem konservos la informojn. Koncerne financajn negocojn, bankoj estos tute superflujaj. Tiel ankaŭ notarioj koncerne vendon de domo...ktp.

Bitmono por scivolemaj senspertuloj

- ❖ *Bitmono estas virtuala valuto, kiu ekzistas nur en ies komputilo aŭ smartfono.*
- ❖ *Estas nur administrebla per virtuala monujo, kuplata al unika kodo, konsistanta el 36 ciferoj kaj literoj.*
- ❖ *Avantaĝoj estas i.a. la uzokomforto kaj la rapideco de pagmaniero.*
- ❖ *Ekzistas nek centra estraro, nek banko, kiuj ion ajn kontrolas; financa kompensaĵo por bankoj por administri vian monon ne estas pagenda.*
- ❖ *La valuto foje estas submetata al kurzofluktadoj, depende de ofertado kaj mendado kaj de la aktuala emocio. Do, entute suspektinda investado!*
- ❖ *Ekzemple en Belgio jam 70 entreprenoj akceptas bitmono kiel pagilon, kaj ekzistas eĉ ejoj, kie oni povas ŝanĝi bitmonon kontraŭ eŭroj.*
- ❖ *Estas tri manieroj por akiri bitmonon.*
 - *Vi vendas varon aŭ servon kaj akceptas bitmonon kiel pagilon.*
 - *Vi aĉetas bitmonon tra reta monŝanĝejo aŭ aŭtomato.*
 - *Vi povas “minekspluati” (< Angle: “to mine”) bitmonon, se vi posedas fortegajn komputilon kaj programaron, kiuj povas solvi kompleksan, matematikan puzzleon.*
- ❖ *En la estonteco oni verŝajne devos redifini la terminon “numismatiko”.*
- ❖ *Se vi dum la legado iĝis entuziasma, tamen ne forgesu: la fisko kaj la bankoj jam febre serĉadas strategio(j)n por nuligi la novajn, financajn sendependecon kaj memstarecon de la modernaj korsaroj!*

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

30.01.2016 22:27

Saluton kara Jozefo,

Hodiaŭ mi jam sendis al vi la unuan de vi provlegitan kaj korektitan numeron de la tria jarkolekto 2016.

Ni ege dankas vin pro via akurata kaj tre utila laboro por "Esperanta Numismatiko". Via helpo multe faciligas nian taskon, ĉar estas konate, ke verkistoj estas blindaj kiel talpoj koncerne la proprajn erarojn.

Ni do definitive kaj volontege akceptas vin kiel kunlaboranton de nia teamo kaj kore deziras, ke vi daŭrigu vian kontribuon favore al nia juna fakgrupo.

Volonte ni krome sendos al vi la unuajn jarkolektojn, sed sen peto korekti ilin, evidente.

Ni dankas kaj salutas vin

numismatike kaj samideane,

Bert

31.01.2016 7:02

Dankon, kara Bert, pro la alsendo de la numeroj de via/nia revuo. Vi prave skribas, kaj mi el sperto scias, ke ni estas blindaj pri niaj propraj eraroj, mistajpoj.

Via laboro estas vere tre utila por Esperanto, ĉar vi ellaboras tian faceton de nia kulturo, kiu estis ĝis nun malpli kultivata. Min, kiel vortariston aparte interesas via terminologia laboro.

Do mi esperas, ke nia kunlaboro utilos por ni ambaŭ.

Kun amikaj salutoj: Jozefo

01.02.2016 20:57

Kara Jozefo,

Mi ĝojas ke vi estas vortaristo.

Krom kompili iam (sed kiam?) katalogon pri numismatikaĵoj esperantaj, nia dua celo estas kompili numismatikan esperantan terminaron. Mi do ŝatus ricevi de vi kelkajn konsilojn, pro via sendube granda sperto.

Amike,

Bert



30.01.2016 19:28

Koregan dankon pro la revuo!

Amike via Elda

01.02.2016 21:13

Kara Elda,

Tute ne dankinde!

El via antaŭlasta letero mi lernis ke Achille Tellini povus esti la kreinto de la belega insigno kies foton vi sendis al mi. Mi trovis pri li informojn en Vikipedio, sed nenion pri la insigno. Kial vi opinias ke li povus esti la kreinto aŭ la farinto?

Respondo tute ne urĝas!

Mi anticipas dankas vin kaj sendas amikajn salutojn!

Amike via,

Bert

04.02.2016 15:08

Kara Bert,

Verdire mi ne plu memoras kie mi trovis la informon: mi nur scias, ke ĝi estis en la itala lingvo kaj tion mi konservis en mia arkivo pri Achille Tellini. Mi havis rilatojn kun la pranepino de Tellini, sed post traserĉado, de ŝi mi ne ricevis tion. Tellini estis lerta grafikisto kaj produktis ekzemple plurajn eks-librisojn kaj en la jaro de tiu eldono li estis tre aktiva en tiu kampo. Se vi intencas iam tion aperigi, eble estus pli bone konfesi pri ne tute certa informo.

Tamen, kiam estos tempo ĉe mi, mi daŭrigos la esploradon.

Plej karajn salutojn Elda

PS: gratulojn pro via lasta ENA-revuo, vere interesege, kun multe da detaloj, ĉefe teknikajn, kaj la terminaro. Vere mirindan laboron vi estas faranta.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.01.2016 3:35

Kara, Dankon pro la interesa revuo.

HORI Jasuo

01.02.2016 20:59

Kara japana samideano Jasuo,

Tute ne dankinde! Mi esperas ke la legado placôs al vi.

Amike,

Bert



31.01.2016 20:36

saluton!

aliĝo estas senpaga.
ĉu demisio estas pagenda?

elkore

Mireille Grosjean

31.01.2016 23:28

Bonan vesperon, sinjorino Grosjean!

De la komenco estis nia celo, ne havi estraron, por ke ni ne perdu tempon pro paperachoj kaj neutila laborado koncerne financojn. Do, nia fakgrupo ne povas bankroti!

Do, neniu devas nek por iu kotizo nek por la revuo pagi ion, ĉar ni ne havas kostojn kaj ne bezonas monon.

Kiu alighas, estas kaj estos membro, ricevos la revuon kaj SE EBLE foje kunlaboros per sendo de informoj, fotoj de medaloj ktp, sed nur volontule, ne devige.

La membreco estas do dumviva, sed simpla mesagho sufichas por ne plu resti membro kaj ne plu ricevi la perretan revuon. Ne kredeble? Tamen! Ne kutime? Jes, evidente, sed nur en mondo kiu pensadas nur pri profito!

Ne timu, ni celas nur esti pioniroj kiuj dissendas informojn pri tro neglektita kaj neglektata aspekto de nia kora lingvo kaj movado : NUMISMATIKO. Demisio estas kaj restos tute SENPAGA!

Kun amikaj kaj numismatikaj salutoj,

BERT BOON



01.02.2016 10:53

Estimata s-ro Boon,

kore ni dankas al vi pro la alsendo de la revuo de la Esperanto-Numismatika Asocio!

Korajn salutojn,
Bernhard Tuider

01.02.2016 20:50

Estimata s-ro Tuider,

Ne dankinde. Mi esperas ke ghi plaĉos al la legontoj!
Tutkore,

Bert Boon



31.01.2016 17:39

Estimata samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto en la historio de Esperanto, estis fondita en 2013 la probable unua fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio”(ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko”.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro de moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektiindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur du jaroj ĝis 44 individuaj membroj kaj 15 esperantaj bibliotekoj k. muzeoj, dise en la mondo.

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!
Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”) kaj krome la *PERRETA* revuo ankaŭ estas tute SENPAGA! Kaj tio neniam ŝanĝos!

Post aliĝo, oni tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn 8 (ok!) kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn.(4 n-roj jare)

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2015 sur p. 68. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Aldone vi nun ricevas la novan numeron (jarkolekto 3, n-ro 1) kiel provnumeron.

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

02.02.2016 23:38

Mi konsentas aliĝi!

03.02.2016 17:16

Estimata samideano Roger Prieto,

Kun ĝojo ni bonvenigas vin kiel novan, 45an individuan membron de ENA.

Aldone vi ricevos la ok numerojn de la du jam aperintaj jarkolektoj. Ni deziras, ke la legado kaj la ilustraĵoj estu agrablaj kaj interesaj por vi.

Ni ankaŭ invitas vin fojefoje aktive reagi per demandoj, petoj, rimarkoj, se eble kontribuajtoj ktp.

Ĉar vi estas la unua membro el via regiono, estus tre interesa por nia revuo scii, ĉu ekzistas/is ĉe vi (en asocioj, kluboj ktp.) medaloj, moneroj aŭ aliaj numismatikaĵoj esperantaj.

La mesaĝo de Xavier Alcalde estas ne tre klara por ni ("Mi peras"). Ĉu ankaŭ li volas ricevi la revuon kaj membriĝi?

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA

04.02.2016 17:38

Kara samideano,

Dankon pro akcepti min. Mi estas el Barcelono sed jam de antaŭ ok jaroj loĝas en Oporto, norde de Portugalio.

La mesaĝo de Xavi Alcade dirante "mi peras" estis resendo de informoj pri la asocio al la listo de katalunaj esperantistoj.

Amike,
Roger



03.02.2016 16:30

Saluton Bert,

En via lasta ENA-revuo estas foto de rumana poŝtkarto kun la alvoko de Zauner.

Ĝin mi jam aperigis en "Bulletin Européen" de aŭg.-sept. 1999 kun franca traduko de la teksto.

Ĉu vi povus sendi al mi kopion de tiu poŝtkarto ĉu en Word ĉu en Windows?

Antaŭdankon !

Kore,

Germain

03.02.2016 17:24

Kara Germain,

Kompreneble! Mi aldonas kopion de tiu karto.

Ĉu vi jam vidis foton aŭ portreton de Zauner? Mi ne trovis ĝin por nia revuo.

Kun amikaj salutoj,

Bert

03.02.2016 21:16

Dankegon Bert !

Kore,

Germain

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

05.02.2016 00:04

Estimataj Geestraranoj de la Loka Kongresa Komitato, karaj samideanoj,

Dum la UK en Lille mi havis la honoron kaj la ĝojon ĉeesti dum la prezentado de via lando kiel kandidato por organizi la 102an Universalan Kongreson en Seulo. Mi gratulas vin, kiuj prave denove havos la okazon montri kiel vi sukcesos aranĝi la plej gravan esperantan eventon de la jaro 2017.

Niaj amikoj filatelitoj kaj ties fervora, laborema prezidantino S-rino Elda Doerfler prave jam ĝojas pro la certa eldono en Nitro (2016) kaj en Seulo de diversaj filatelaĵoj, kiel poŝtmarkoj kaj glumarkoj.

Antaŭ 2013 neniu petis al la tiamaj LKK-j ne forgesi la numismatojn kaj eldoni ankaŭ memorigan medalon. Sed poste la situacio ŝanĝiĝis.

En 2012 ni prenis la iniciativon fondi (verŝajne por la unua fojo en la historio de nia Movado) fakgrupon pri esperanta numismatiko. La nova fakgrupo (vidu ankaŭ la Jarlibrojn 2013, 2014

kaj 2015), Esperanto-Numismatika Asocio (ENA), havas propran senpagan revuon (“Esperanta Numismatiko”) kiun ĝi dissendas nuntempe al 45 individuaj membroj kaj al 15 diversaj esperantistaj asocioj, bibliotekoj kaj muzeoj en la vasta mondo.

En la nomo de tiu rapide kreskanta membraro kaj ĉiuj venontaj membroj ni petas vin konsideri la peton kaj la eblecon eldoni esperantan medalon, ekzemple parte kun esperanta, parte kun korea surteksto. Tiel vi alparolus pli grandan publikon, eĉ koreanojn kaj (aliajn) ne-esperantistojn!

Vi ne timu pri ebla (mal)sukceso de la vendado, se la medalo estas suĉe bela. *Ekzemple*, kial ne je unu flanko famega monumento aŭ konstruaĵo en via ĉefurbo, aliflanke busto de nia Zamenhof?

Krome, ĝi estu pagebla ankaŭ por la “maldikaj” monuoj. Garantio certe estos mendig la medalon al interesiĝontoj kaj pagigi ilin anticipe al speciala konto. Por la UK mem vi povos decidi pri la kroma eldonkvanto laŭ la sukceso de la perreta vendo. Retaj adresoj tutmondaj por propagandi certe ne mankos, ĉu?

Kredu min, multajn jarojn poste la medalo restos la plej brila elpendaĵo de la 102a Universala Kongreso!

Private, mi povas jam aldoni ke mi mem mendos minimume 3 ekzemplerojn kaj ke mi propagandos en esperantistaj rondoj en Belgio kaj anoncos la eventon en diversaj revuoj, unuavice en la revuo de ENA, en kiu krome aperos granda artikolo kaj fotoj pri la UK 2017 kaj pri la medalo mem.

Altestime kaj samideane,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA

Ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

05.02.2016 03:52

Estimata Bert Boon,

Kun danko mi ricevis vian leteron.

LKK por Seula UK serioze konsideros vian konsilon kaj rekomendon.

Jen mi aldonas retadreson de LKK-ano pri filatelaĵo por Seula UK.

Lia nomo estas s-ro Kang Hongu kaj lia retadreso estas 'kanguruo999@[gmail.com](mailto:kanguruo999@gmail.com)'.

Mi esperas, ke vi havos kontakton kun li.

Kun koraj salutoj, Sincere via, LEE Jungkee



06.02.2016 20:53

Mi konsentas aliĝi.

Didier Loison

06.02.2016 22:51

Estimata samideano Didier Loison,

Kun ĝojo ni bonvenigas vin kiel novan, 46an individuan membron de ENA.

Aldone vi ricevos la ok numerojn de la du jam aperintaj jarkolektoj. Ni deziras, ke la legado kaj la ilustraĵoj estu agrablaj kaj interesaj por vi.

Ni ankaŭ invitas vin fojefoje aktive reagi per demandoj, petoj, rimarkoj, se eble kontribuaĵoj ktp.

Ĉar vi estas la unua membro el via regiono, estus tre interesa por nia revuo scii, ĉu ekzistas/is ĉe vi (en asocioj, kluboj ktp.) medaloj, moneroj aŭ aliaj numismatikaĵoj esperantaj.

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA



07.02.2016 19:50

Kara Bert,

Ĵus mi elprenis el mia retkesto la unuan ĉi-jaran numeron de via/nia numismatika bulteno, kaj ĝi rememorigis min, ke mi ŝuldas al vi mian respondon rilate al eventuala nitroa UK-medalo. Cetere, dankon, ke vi aperigis en ĝi vian leteron al Petro Baláž, kaj mi vidis, ke reago de Elda Doerfler estis bonveniga!

Mi parolis kun Petro, sed bedaŭrinde, kun ne kontentiga rezulto. Oni ja esploris eldonon de la medalo, sed estus necese komenci agi jam multe pli frue, krome ankaŭ la financon flankon de la afero oni ne povas neglekti.

Tial mi rekomendas al vi jam nun instigi labori pri la UK-medalo la organizantojn de la venontjara kongreso - eble ili estos pli sukcesaj!

Se intertempe Petro mem respondis al vi, pardonu duoblaĵon...

Amike, korsalutante vin kaj ankaŭ vian ĉarman edzinon Vivi Fejfi



01.02.2016 20:48

Kara amiko Stanislaw,

Mi esperas, ke vi fartas bone kaj ke la nova numero de "Esperanto Numismatiko" plaĉas al vi.

La kialo de mia letero estas helpopeto. Okaze de XX JAROJ DE ESPERANTO EN BIELSKO-B(iala) aperis maldika, bronza bareliefo sur malgranda blanka kartono.

Se vi povus kontakti esperantist(in)on de BB, ĉu vi povus demandi kelkajn informojn pri la eldonkvanto de la objekto kaj la nomon de la medalisto? La mezurojn mi scias, ĉar mi posedas ekzempleron.

La celo estas aperigi la foton kaj la informojn en la ENA-revuo.

Denove dankante vin anticipe, mi kore salutas vin.

Amike,

Bert Boon

06.03.2016 23:24

Kara amiko Bert!

Finfine mi post kelkaj semajnoj (eĉ monatoj) ricevis la respondon el Bielsko - Biała lige kun memoraĵo ligita kun ilia festo okaze de XX jaroj de ilia funkciado.

Aranĝo okazis en kultur-domo "Włókniarz" (teksisto) la 13 de marto 1978 jaro kun partopreno de urbaj instancoj.

Tiun karton (memoraĵon) projektis kaj eldonis kolego de unu el klubaninoj (Teodozja Lach). Ŝi mem estis oficiro (oficirino)

de Fajrobrigado en Bielsko-Biała. Ŝi bedaŭrinde mortis jam antaŭ multaj jaroj.

Laŭ la informoj de aktuala prezidantino de esperanta grupo oni preparis 50 aŭ 60 tiuj kartoj (memoraĵoj).

Nenion plu miaj gekolegoj povas aldoni post preskaŭ 40 jaroj.

Des pli ankaŭ mi nenion povas aldoni. Pardonu.

Se vi bezonas originalon mi povas ĝin sendi al vi. Mi havas.

Dankon pro la sendita numero de nia revuo.

Amike - Stanislavo Mandrak

07.03.2016 14:42

Saluton kara Stanislavo!

Mi ege ĝojas pri viaj mesaĝo kaj informoj. Nun mi povos akurate priskribi la numismatikaĵon el Bielsko-B. Post 40 jaroj malfacilas al iu ajn rememori detalojn, evidente. Tamen la de vi menciitaj informoj multe taŭgas. Dankon!

Mi krome estas kontenta, ke la revuo plaĉis al vi. Viaj eventualaj rimarkoj aŭ proponoj ĉiam estos bonvenaj. Vi ja scias, ke mi ŝatas reciprokane kunlaboron, se eble.

Ĉar vi proponas sendi al mi originalon, mi petas sendi unun al mi. Tamen ne urĝas! Mi anticipe denove dankas vin!

Ĉiam je via servo reciproke, mi tutkore salutas vin.

Amike,

Bert



ANONCOJ

&

EVENTOJ



Dum la movada foiro ELF-AREK denove havos propran budon. Elda Doerfler invitas ĉiujn filatelistojn kaj aliajn scivolemulojn partopreni en la filatela UK-kunveno. Ŝi atendas ĉiujn ĉe la kongreseja kunvensalono, kiel skribite en la kongresa libro.

Eksterkongreseje oni muntos propagandekspozicion, kaj tiuloke oni povos ricevi unuatagan koverton kun stampo kaj ankaŭ la poŝtmarkon emisiitan okaze de la UK.

La ekspozicio estos de la 25a de julio 2016 ĝis la 29a de julio 2016.

Dum la ekspozicio funkcios ankaŭ speciala okaz-stampilo. La esperantistoj kiuj volas partopreni, bonvole alportu siajn eksponaĵojn ĉe la alveno la 23an de julio en la akceptejo.

Filatele kaj samideane,

Elda Doerfler



Esperantomuzeo en Vieno skanas publikaĵojn pri la unuaj Universalaj Kongresoj

Estimataj,

mi ŝatus informi vin, ke la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko nuntempe skanas grandan parton de la publikaĵoj pri la unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto. La publikaĵoj pri la unuaj 15 Universalaj Kongresoj jam estas legeblaj en la interreto, dum la venontaj semajnoj ni iom post iom enretigos pluajn skanaĵojn.

Universalaj Kongresoj 1905-1939

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/23525.htm>

Skanitaj libroj

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

Skanitaj periodaĵoj

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>

Korajn salutojn,

Bernhard Tuidler



Bitoteko

Se vi hazarde aŭ akcidente forviŝis kompletan numeron de “Esperanta Numismatiko”, vi tutsimple serĉu en Google por trovi la kompletajn jarkolektojn de nia revuo.

Agu tiel:

Google

Skribu en Google: bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7

Klaku: [Bitoteko - Federación Española de Esperanto](#)

Vi ricevos: **Bonvenon al Bitoteko!**
Jen la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio



[Gazetoteko · Hemeroteca Ĉefpaĝo de la sekcio](#)

Iru suben kaj trovu: [Kolektoj en ĉi sekcio](#)

Pli suben al:



[Esperanta numismatiko \[2014- \]](#)

[Organo de Esperanto Numismatika Asocio](#)

Ana Manero

Biblioteko Juan Régulo Pérez

www.esperanto.es/biblioteko

biblioteko@esperanto.es

Ni tutkore dankas Ana Manero-n pro ŝia iniciativo.



Radio- kaj televid-elsendoj

ESPERANTO RADIO

KAJ TELEVIDO



<http://novajhoj.weebly.com>

Estimata samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto en la historio de Esperanto, estis fondita en 2013 la probable unua fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio”(ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko”.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro de moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur du jaroj ĝis 46 individuaj membroj kaj 15 esperantaj bibliotekoj k. muzeoj, dise en la mondo.

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!
Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”) kaj krome la *PERRETA* revuo ankaŭ estas tute SENPAGA! Kaj tio neniam ŝanĝos!

Post aliĝo, oni tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare)

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2015 sur p. 68. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”